



2*86

.113.

starto


ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



PACMARŜO en JABLONEC n/N

STAVEBNICE PODVOZKU NÁKLADNÍHO PŘÍVĚSU

AK-2P



Obsahuje tyto díly:

» náprava	390,— Kčs
» oj	120,— Kčs
» podpěra	20,— Kčs
» pojistné zařízení	50,— Kčs
» 2 ks těmen (ø A 12,50)	25,— Kčs
» 2 ks blatník vč. zástěrek (ø 85,—)	170,— Kčs
» nosník K 1000/0	250,— Kčs
» 2 pneu B-Scaoter 4x8 (ø 105,—)	210,— Kčs
» 2 duše (ø 15,—)	30,— Kčs
» 2 disky 2,85x8" — typ A / (ø 225,—)	450,— Kčs
» 2 hřídel (ø 130,—)	260,— Kčs
	2 584,— Kčs

Montáž podvozku	148,50 Kčs
(s vydáním tech. průkazu)	2 732,89 Kčs
Čalkem cewa	

» úhelníkový rám kerby	310,— Kčs
» ocelová korba	1 300,— Kčs
» oj s nosníky jen pro ocel. korbu	390,— Kčs

všňa (bez kerby)	cca	50 kg
celková hmotnost		480 kg
úhelníkové zařízení		320 kg
max. šířka		1 500 mm
délka		2 500 mm
výška		730 mm

Podvozek nákl. přívěsu AK-2P je bez elektrické instalace (zatím není dodáván panel pro tabulku SPZ vč. svítilen) a bez kerby, která je v návrhu pro výrobu.

Na podvozek nákl. přívěsu AK-2P je nutno utvořit písemnou objednávku. Formuláře objednávek vyžádejte na: INKLEMO VD, 100 00 Praha 10, Třebohatická 3, tel. 78 14 749. Dodací lhůta podvozku (vč. montáže) je závislá na přijatém počtu objednávek; Zákazník bude písemně vyzván k osobnímu odběru.

Jednotlivé díly stavebnice označené x budou samostatně v prodeji výhradně v prodejních VD INKLEMO — Praha:

Praha 1, Skořepka 8	telefon: 26 68 24
Praha 2, Bělehradská 128	22 95 31
Praha 4, nám. Hrdinů 5	43 54 65
Praha 7, Dukelských hrdinů 4	87 80 16
Praha 8, Sokolovská 170	82 04 81
Praha 9, Sokolovská 201	83 14 24

Na tyto díly nebudeme přijímat objednávky, ani nebudou zaslány na dobírku (s výjimkou litinového nosníku K 1000/0).

Výrobek byl kladně testován (vč. podrobného popisu) v časopise SVĚT MOTORŮ č. 34/1983.

Inklemo Praha

POST LA XVII-a KONGRESO de KPĈ ...

Fine de marto okazis en Prago la XVII-a kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio. Ĝi estis grava evento, kiu staris en la centro de atento de nia tuta socio. La kongreso ne nur bilancis la pasintan jarkvinon de la politika kaj ekonomia evoluo de nia lando, sed ĝi diskutis kaj skizis la ĉefajn direktojn de la ekonomia kaj socia disvolviĝo de nia lando por la nuna jarkvina periodo, t.e. por la jaroj 1986-1990, kaj ankaŭ por la fino de nia jarcento, do ĝis la jaro 2000-a.

La ĉefaj direktoj de la ekonomia kaj socia disvolviĝo de Ĉeĥoslovakio montras vojojn por la nova etapo de disvolviĝo de la sociaj produktivaj fortoj, de la socialisma demokratio kaj ankaŭ de la proleta internaciismo. Por la socia disvolviĝo havas elstaran signifon ankaŭ la kulturo kaj arto, kiuj plenumas gravan rolon ĉe la riĉigado de la spirita vivo, ĉe disvolviĝo de kreivaj fortoj kaj kapabloj de homoj, en ilia ideologia kaj morala kresko.

En la Politika raporto de la CK KPĈ al la XVII-a kongreso de KPĈ, prezentita fare de la ĝenerala sekretario de CK KPĈ G. Husák, estis klare esprimita, ke multe pli altajn pretendojn oni devos meti sur la kultur-edukon kaj interes-artan aktivecojn de la popolo. Ili estas grava parto de la utiligo de libera tempo de homoj, grava parto de la socialisma vivmaniero. Gravan taskon havas la kulturo ankaŭ ĉe plenumado de sia internacia celo en la procedo de proksimiĝado kaj reciproka riĉigado de kulturoj de la socialismaj landoj kaj de la progresemaj fluoj en la mondo, en la batalo por la paco kaj interkompreniĝo inter la nacioj.

Laŭ la raporto kaj ankaŭ laŭ la decidoj de la kongreso evidentas la graveco de la kultura, ideo kaj internaciisma aktivecoj de homoj, de ĉiuj loĝantoj de nia lando. Ankaŭ la Esperanto-movado kiel kultura kaj internaciisma movado havas gravan kaj neanstataŭigeblan rolon en la aktivecoj de niaj loĝantoj. Cetere, en sia raporto D-ro Husák klare diris: "Ni estas konvinkitaj, ke ĉiuj sociaj organizaĵoj kaj interes-asocioj ankoraŭ pli aktive plenumos sian signifan socie utilan mision." Kaj da tiaj taskoj staras antaŭ nia movado tuta vico. Tion pli, ke en la venonta jaro 1987 ni celebros la centjaran jubileon de Esperanto kaj en la sama jaro okazos la 5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La kongreso fariĝos turnpunkto en la evoluo de nia movado.

Antaŭ nia movado staras nun la tasko de plifortigo de la lingva, kultura kaj ideologia nivelo de niaj anoj, plifortigo de nia laboro por la paco kaj por plifirmigo de la socialisma internaciismo. Por atingi tion necesas firmigi la agadunuecon, plifortigi la gvidan rolon de la partio en nia movado kaj precipe en la gvidaj organoj de la Asocio, firmigi la demokratan

centrismon en la organiza strukturo de nia movado, likvidi la elitismon kaj subteni la lokajn grupojn. La XVII-a kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio montris klaran vojon ankau al Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

-red-

Volgograda renkontiĝo "Esperantistoj por paco kaj malarmado"

Sovetiaj esperantistoj organizis la 8-an ĝis 11-an de aprilo 1986 la internacian pacrenkontiĝon kaj solvis tiel fakton, ke en Internacia Jaro de Paco ne efektiviĝis la tradicia pacrenkontiĝo en Pardubice.

Urbo Volgograd ne estis elektita hazarde por tiu ĉi pacforumo. Ĝuste ĉi tie dum la dua mondmilito ricevis faŝistaj armeoj pereigan baton. Monumentoj en la urbo rememorigas ĝiajn heroajn defendantojn, kiuj ĵuris ne retiriĝi kaj tiel malebligi vojon suden al germanaj soldatoj. Ruinoj de muelilo - sidejo de ruĝ-armea stabo en Stalingrad - rememorigas ĝis nun kruelecon de milito al tiuj, kiuj la militon ne travivis. La plej persistaj bataloj koncernis la Mamajev-kurganon, kiu kelkfoje ŝanĝis la posedanton.

La internacian pacrenkontiĝon partoprenis esperantistoj el 15 landoj kaj el 52 urboj de Sovetunio - la plej malproksima urbo estis Magadan ĉe Oĥotska maro. Krom el Eŭropo ĉeestis esperantistoj el Usono, Kanado, Japanio kaj Vjetnamio.

Pri la pacrenkontiĝo de esperantistoj agnoske skribis Volgograda Vero kaj Vespera Volgograd. Esperanton oni nomis LINGVO DE PACO.

Eksterlandaj gastoj metis florkronojn al militmonumentoj kaj per minuto de silento honorigis memoron de pereintaj ruĝarmeanoj, defendintaj Stalingrad. La gastoj vizitis Panoramon de stalingrada batalo kaj en Planetario rigardis filmon "Granda batalo sur bordo de rivero Volga". Krom tio ili vizitis elektrejon "Voljskaja" kaj estis akceptitaj ĉe urbestro de Volgograd k-do V. I. Atonov.

Dum la tritaga packunsido oni diris multajn gravajn vortojn koncerne la pacdemandojn kaj malarmadon. Ĉiuj ĉeestantoj akordis, ke sen paco kaj malarmado ne eblas plua vivo sur la Tero.

Ĉiuj diskutintoj esprimis sopiron vivi en paco - kiel japana Joŝima Umeda kaj vjetnamia verkisto Daw Ang Han, europaj reprezentantoj, kanadano Normand Fleury au usonano Jim Deer, kiu kunportis leterojn kaj fotojn de siaj samlandanoj, pacamikoj, kiuj aprobas proponon de M. S. Gorbaĉov je moratorio.

En kulturprogramoj esperantistoj konatiĝis kun folkloro de sovetaĵaj respublikoj, kun bulgara kanĉoro Orbita kaj Esperanta teatro el Tomsk.

Fine de traktado estis aprobita rezolucio por ĉiuj esperantistoj kaj homoj de bona volo sur la Tero, subtenantaj pacproponojn de Sovetunio.

El la pacrenkontigo estis sendita saluto al du sovetiaj kosmonaŭtoj en orbita stacio PACO.

Delegitoj kaj gastoj forveturis el Volgograd plenaj de neforgeseblaj impresoj, kiujn ili volas transdoni al siaj samlandanoj.

Milada Hemerková

APELO

Ni, la partoprenantoj de la Internacia Renkontigo "Esperantistoj por la Paco kaj Malarmado" (Volgograd, 8.-12.04.1986), esperantistoj el Aŭstrujo, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Pollando, Rumanio, Usono, USSR, Vjetnamio, kunvenintaj sur la multsuferrinta tero de la urbo-heroo, kie okazis la Stalingrada batalo, sursojle al la 25-jara jubileo de la unua flugo de la homo en la kosmon, en la Internacia tago de memoro pri la viktimoj de la faŝismo, deklaras nian subtenon al la programo de la malarmado, proponita de Soveta Unio, kaj apelacias al ĉiuj esperantistoj, al ĉiuj pacamantoj en la mondo, sendepende de rasa, nacia, religia kaj socia apartenoj, ancorau pli aktive batali kontraŭ la danĝeraj planoj pri militismigo de la kosmo, kontraŭ nuklea kaj alispeca vetarmado, streĉi la fortojn por plene likvidi la nuklean armilaron, grave redukti la aliajn specojn de armiloj kaj armitajn fortojn kaj establi la sistemon de la universala sekureco, la fidinda paco sur nia planedo.

Ni esprimas nian nereteneblan indignon pro la nova eksplodigo de la nuklea bombo, kiun la 10-an de aprilo efektivigis la usona registaro spite de la bona volo, esprimita de Soveta Unio, kiu unuflanke deklaris la moratorion pri ĉiuj nukleaj eksplodigoj kaj denove daurigis ĝin ĝis la unua sekva usona eksplodigo post la 31-a de marto 1986.

Ni alvokas ĉiujn pacamantojn insisti antaŭ Usono, ke ĝi aligu al la moratorio kaj komencu traktadon kun la ceteraj nukleahavaj statoj pri plena likvido de la nukleaj armiloj kaj ĉiuj aliaj rimedoj por amasa ekstermo.

1986-04-11

NI GRATULAS



La 23-an de junio 1986 atingis 75-jarojn oferema funkciulo de la Esperanto-Klubo en Olomouc s-ano Vlastimil Blažek, kiu pro siaj eksterordinaraj meritoj je la Esperanto-Movado en la regiono de Olomouc estis elektita honora prezidento de la Esperanto-Klubo Olomouc.

komuniko

de la 19a konzultigo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj.

En Poprad, Ĉeĥoslovakio, de la 20a ĝis la 26a de aprilo 1986 kunvenis reprezentantoj de E-organizaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio. Oni pridiskutis la aktualan mondsituacion kaj unuanime oni esprimis decidan subtenon al la propono de Sovetunio pri iom-post-ioma likvido de nukleaj armiloj ĝis la fino de la 20a jarcento.

La kunvenintaj reprezentantoj rekomendis al ĉiuj SLEO-j konigi al la monda esperantistaro sian firman volon kunlabori kun diverstendencaj esperantistoj por konservo de la monda paco, kontraŭ militarigo de la kosma spaco.

La kunvenintoj alvokas al la plibonigo kaj pliakтивigo de la laboro por la apliko de Esperanto en profesiaj kaj sciencaj rondoj.

La konsultigo proponas al SLEO-j kaj al ĉiuj esperantistoj organizi solenaĵojn lige kun la centjara jubileo de Esperanto, utiligante tiucele ankaŭ la Rezolucion de UNESKO el 1985.

La 100jara jubileo devus helpi al SLEO-j en la varbado de novaj adeptoj de Esperanto, kreskigo de la membraro de E-asocioj, precipe el junularaj medioj.

La kunvenintoj esprimas sian firman konvinkon, ke la venontjara jubilea UK en Varsovio fariĝos brila manifestacio de la unueco kaj pacamo de la monda esperantistaro.

La partoprenantoj esprimas sian dankon al SEA pro la kreo de bonegaj laborkondiĉoj de la Konsultigo.

Poprad,
la 26an de aprilo 1986

Partoprenantoj de la 19a
Konsultigo de SLEO-j



porpaca sekcio

XIV-a printempa paca marŝo en Jablonec n. Nisou

Sub emblemo de internacia paca jaro marŝis la 26an de aprilo 1986 en Jablonec nad Nisou preskaŭ 500 homoj - esperantistoj el diversaj ĉeĥoslovakaj kluboj, gastoj el GDR /Zittau Meissen, Bernau, Görlitz, Leipzig, Dresden/, Polujo /Swiebodzice/, USSR /Gomel/ kaj multaj neesperantistaj turistoj, gepioniroj kaj aliaj.

Tradician aranĝon organizis Esperantista klubo ĉe Kulturcentro en Jablonec sub aŭspicio de distrikta packonsilio. Partoprenantoj povis elekti diversajn distancojn laŭ sia sperto - je 18 km, 27 km aŭ 35 km tra pitoreska regiono inter la urbo Jablonec kaj tiel nomata "Ĉeĥa paradizo" en ĉirkaŭaĵo de ripozcentro Malá Skála.

Tremion de Ĉeĥa Esperanto Asocio /Ĉeĥa vitro/ ricevis dum amika vespero post la marŝo reprezentantoj de plej multnombraj esperantistaj grupoj - el Praha, el Zittau kaj Meissen. Flej multnombraj grupoj de turistoj kaj gepioniroj ricevis similiajn premiojn de distrikta packonsilio.

Eksterordinaran surprizon por eksterlandaj grupoj preparis membro de la klubo en Jablonec profesoro Jaroslav Hradecký, kiu pretigis apartajn medalojn kun simbolo de Internacia paca jaro kaj dorsflanke kun dato de la marŝo.

La marŝo dum suna printempa vetero bone sukcesis. Ĉiuj partoprenantoj subskribis porpacan rezolucion kaj ricevis diplomojn, turismajn publikaĵojn pri la regiono kaj informojn pri Esperanto-movado.

Dum amika vespero oni jam pridiskutis venontjaran jubilean XV-an marŝon, en kies programo esperantistoj en Jablonec preparas kelkajn allogajn novaĵojn. Jam hodiaŭ ni invitas vin - venu la 25-an de aprilo 1987 al Jablonec nad Nisou. Kun plezuro ni sendos detalajn informojn.

Esperantista klubo ĉe Kulturcentro
loka grupo de ĈEA
poŝtkesto 190
466 21 Jablonec nad Nisou
Ĉeĥoslovakio

ARTLITERATURA SEKCIO



ĈU "SITUACIO SENKONSOLA" AŬ "BELETRA REVELACIO"?

(Kompletan artikolon alportos la revuo PACO)

... Tre koran dankon pro "Kvarfolio", varman gratulon (kun la escepto de "far"!) kaj sincerajn bondezirojn por vi persone kaj por via laboro. (D-ro Ivo Lapenna, Anglio)

... Mi dankas por la bondeziro okaze de mia naskiĝtago kaj ankaŭ por la donaceto, kiu min, bedaŭrinde, ne ĝojigis, eĉ male - tre, tre... Situacio senkonsola. (Vuk Echtner, Domaŝlice)

... Tre volonte mi akceptis Vian opinion "Dum por la stilo komuna validas la devizo "sufiĉe kaj necese", en arta stilo funkcias ĝuste kontraŭe la regulo "abunde kaj redunde". Jen la leĝeco, kiu validas ĝenerale en ĉiuj etnaj lingvoj. Kaj la sama leĝeco devas tute logike validi ankaŭ por la arta literaturo "internacilingva". Sed por venonte almenaŭ parte tiu ĉi regulo validos ankaŭ por la lingvo "faka": mi renkontas la samajn problemojn (de "malsufiĉo" kaj "malneceso") dum preparo de mia nova verko BLAZONOJ KAJ FLAGOJ EN ARTHISTORIA EVO-LUO. (Mi bone konsciis, ke la regulo ne estas originale via, sed... de s-ano Rumler - pardonu.) Sed ĉu gravas, kies estas la regulo? Mi tute agnoskas ĝin - ĉar por venonte ĝi estos same grava por ĝenerala agnosko de la Lingvo Internacia. (Jaroslav Klement, Karlovy Vary)

... Tradukado estas mia plej ŝatata okupo. Por tio oni bezonas perfektajn vortarojn, kiuj dume ĉe ni mankas (por la estona lingvo). Do necesas ilin mem prepari. Nun ankaŭ nia E-klubo havas sian bibliotekon, kie troviĝas ankaŭ "Nur tri kolorojn". Aldoniĝas "Kvarfolio" - post kiam mi ĝin plene tradudis. Kio min iom ĝenas, tio estas la multaj "Glosoj" en la malgranda kajero. Historiistoj skribas, ke volapukistoj kapablis paroli sian lingvon nur per vortaro. "Dio donu", ke la sama sorto ne trafu ankaŭ Esperanton! (Jaan Ojalo, Estonio)

... Vi tre agrable surprizis min per la sendo de la broŝuro Kvarfolio kun poemoj kaj prozoj de kvar ĉefaj gepoetoj. Sed kiam mi ĝin eklegis, mi tuj raviĝis: vi sendis al mi veran juvelon, sur 32 paĝoj - juvelo beletra, presa kaj eldona, ĉiu, ĉiu faceto de la libreto estas plenzorge tralaborita. Plenkoran, varman, profundan dankon! Mi konstatas, ke vi multe kreskis, ke via poezia staturo kiel internacilingva verkist-

no altas multajn klaftojn, pli ol kiam mi eldonis vian tre bonan Nur tri kolorojn! ... Ĉar vin mi jam konis, kaj same mi konas S-rojn Jiří Kořínek, mi ne tiel surpriziĝis de la bonaĵoj de ambau. Sed nun mi tre pozitive, vere entuziasme kaj admire impresis S-ro Rumler (kiun mi antaŭe ne konis eĉ laŭnome), same kiel poeto ol kiel prozverkisto. Mi estas ravita de lia Lasta ĉevalo kaj same ravita de lia Poezia ventumilo de Eli Urbanová, pro la ĝiskerna majstrado, suverena ekspluatado de la latentaj kaj povebloj de nia lingvo internacia. Por mi tiu kajero alportis beletran revelacion, kaj pro tio mi volas al vi aparte danki. Ĝajne en Prago povos nun ekformiĝi nova skolo de nia beletro, kiel iam la franca skolo, poste la budapeŝta skolo, pli poste la t. n. skota skolo, kiun mi debutigis per la eldono de Kvaropo. La broŝuro Kvarfolio estas ja tre esperiga, promesplena. (Prof. Juan Régulo Pérez, Kanarioj) (Rim. de la aŭtorino de ĉi artikolo: Surbaze de Kvarfolio estis Rumler pere de prof. Régulo invitita al grava internacia kunlaboro.)

... Nu, vi kaj Karen en traduko de Kořínek estas malnovaj konatoj, kiujn oni tamen ĉiam denove ĝuas per relego. Vidman mi ne konis. Kurioze, kiel lin - granda mondvojaĝanto - tiel impresis ĝuste unu lando, au eble unu popolo. Kvankam li ege kondensas siajn ideojn, felice li ne provas imiti la japanan ĥajkon... El la artikoleto "Margene de la japaneskaĵoj far Cestmír Vidman mi ĉerpis informon tre utilan por mi, nome li preparas specialan sinoniman vortaron de E. Lia iniciato estas tre laŭdinda kaj ĝia realigo tre ege utila al verkistoj kaj vortaristoj. Espereble ĝi tre baldaŭ efektiviĝos en la formo de disponebla eldonaĵo. Pri Rumler: ... Ĉar mi konsideris Rumleron, simile al Kometo Halley, fenomenon, kiu aperas nur unufoje ĉiun centan jaron sur la firmamento (ĉikaze de la E-a poezio) ... samtempe mi postulis de ĈEA tujan surbendigon au surdiskigon de la poemo far bonega deklamist/in/o, ĉar ĝi estas eĉ pli aŭdinda ol leginda. (Leopoldo H. Knoedt, Brazilo)

Eli Urbanová

NI GRATULAS



Nia konata Esperanto-poetino Eli Urbanová, membrino de la Esperantista Klubo en Prago kaj aktiva membrino de la Artliteratura sekcio de ĈEA, fariĝis akademianino. La 16-an de aprilo ŝi estis elektita membrino de Akademio de Esperanto. La aktiveco de Eli Urbanová estas vere granda. Ŝi verkis tri poemarojn: Nur tri kolorojn, El subaj fontoj kaj Verso kaj larĉo. La lasta ĵus aperis de eldonejo Iltis. Nun Eli Urbanová verkas siajn memorojn, en ĵurnalo Večerní Praha (Vespera Prago) en majo aperis poparte ŝia ĉeĥa novelo "En Sárka-valo pluvas dufoje" kaj en la Praga E-Klubo oni prezentis per sonbendo ŝiajn elektitajn poemojn, deklamatajn de la drama artistino Eva Seemannová.

el fervojista movado

La 19-a jarkonferenco de Fervojista Sekcio de ĈEA

En la tagoj 4-an ĝis 6-an de oktobro 1985 okazis en Ĉeská Třebová jam la 19-a jarkonferenco de FS ĈEA.

Ĉeská Třebová estas orientbohemia urbo, situanta sur fervojkruciĝo de linioj Praha - Olomouc kaj Praha - Brno, kie kontaktas montaro "Orlické hory" kun Bohemia-Moravia montetaro. La urbo havas sian tradicion de teksistoj kaj pli novan tradicion de la granda fervojkruciĝo, krom tradicioj historiaj, politikaj kaj kulturaj. Ne ĉiuj scias, ke jam en 1921 ĝuste tie ĉi, en la "urbo de fervojistoj" estis fondita nia tutŝtata fervojista Esperanto-movado. Post la jardekoj estis agado de la fervojistoj ĉesigita, tamen en 1960 ĉi tie oni denove fondis esperantan klubon "Amikeco", konsistantan plejmulte el fervojistoj. Kaj la 17-an de aprilo 1966 okazis en Ĉeská Třebová la unua jarkunveno de la nova ĉeĥoslovaka fervojista landa asocio. Do okaze de la 25jara jubileo de E-klubo Amikeco oni tie ĉi okazigis ankau 19-an jarkonferencon de FS ĈEA.

Vendrede post alveno kaj loĝigo ni kolektiĝis antaŭ la 14a horo sur la kvara perono de la fervojstacio, de kie ni forveturis per speciala trajno kun du vaporlokomotivoj al lokomotiveponejo Česká Třebová, kie ni partoprenis "Tagon de la malfermita pordo" okaze de 140jara datreveno de la lokomotiveponejo. Kun akompano de la sperta gvidanto ni trarigardis kaj "pripalpis" ekspoziciatajn tie lokomotivojn vaporajn, elektrajn, dizelelektrajn kaj motorajn, eksciante multajn informojn de la "deĵorantaj" sur ili lokomotivestroj. Poste ni, gvidataj de sperta esperantisto ing. Ladislav Kovář el Česká Třebová, vizitis regadejan turon de la plej granda manovra stacio en nia lando. Kun admiro ni spektis milojn da relajsoj, radarojn kaj aliajn teknikajn instalaĵojn ebligantajn sekuran funkciadon de la trakbremsoj kaj aliaj instalaĵoj en la regad-turo, konstruitaj en valoro proksimume de cent milionoj da kronoj por ebligi modernan funkciadon de tiu ĉi manovra stacio.

Sabate antaŭtagmeze okazis en hotelo Moskva labora parto de la konferenco (samtempe en alia loko okazis solena kunveno de E-klubo Amikeco). Raporton pri agado de FS ĈEA dum lasta fervojista jaro faris la prezidanto Jaroslav Kašparec. Dele-

gitoj de la sekcio partoprenis jarkunsidojn de niaj najbarlandaj FS en GDR, Hungario kaj Pollando kaj aliajn renkontojn de la fervojistoj, per kio oni ĉerpis kaj interŝanĝis spertojn por laboro de la sekcio. Post forpaso de s-ano Krejčík stagnas kunlaboro kun niaj slovakaj kolegoj. Dum kelkaj jaroj la membrobazo de FS restas stabila, ĉirkau 75 anoj. Estas dezirinde varbi novajn anojn kaj pliakтивigi la malnovajn. Malavantaĝo estas ĉijara neaperado de Starto, ĉar oni ne havas propran bultenon por ĝustatempe informi pri ĉio.

Poste prezidanto de Terminara Komisiono Jaroslav David raportis pri laboro de TK. La fervoja terminaro estas preskauptute kompilita, restas tasko unuecigi difinojn de iuj terminoj. Li petis helpon de la fakuloj por plenumi tiun taskon.

Sekvis raporto de kolego Tomíšek pri informado. Oni sukcesis aperigi vicon da artikoloj kaj informoj en Internacia fervojisto, DEFA-bulteno kaj en fakaj ĉeĥlingvaj gazetoj Železničář, Jihomoravský železničář kaj Trat družby. Sentebla malavantaĝo estas ĉijara stagno en aperado de Starto.

Poste la konferenco elektis novajn komitatmembrojn. Anstataŭ retiriĝintaj pro okupateco prezidanto kaj sekretario oni elektis novan prezidanton František Strumínský kaj sekretariinon Marta Křenková.

La konferencon partoprenis ankaŭ gastoj - kolegoj el Aŭstrio, FRG, GDR, Hungario kaj Jugoslavio. Multaj el ili salutparolis kaj dum la diskuto interŝanĝis spertojn el agado de siaj sekcioj. Menciinda estas parolo de la jugoslava kolego Marašević pri prepartlaboro por la venontjara IFEF-kongreso en Skopje.

Post komuna tagmanĝo ni grupe promenis tra historia parto de la urbo. Česká Třebová apartenas al la plej malnovaj urboj en orienta Bohemio. Fondita jam en la tempo de reĝo Přemysl Otakar IIa en XIIIa jarcento, ĝi travivis multajn historiajn ŝanĝojn kaj du brulegojn (ekzemple en 1636 estis bruldetruita preskau la tuta urbo). Por ni fervojistoj estas gravaj du datoj, kiuj signifis ŝanĝon en vivo de la urbo: la 20-an de aŭgusto 1845 estis malfermita la trafiko sur fervojlinio Olomouc-Česká Třebová-Praha kaj la 1-an de januaro 1849 sur fervojlinio Brno-Česká Třebová-Praha.

La urbo Česká Třebová estas nuntempe vaste konata kiel urbo de fervojistoj kaj la fervojstacio farigis grava stacio sur ĉefa fervojlinio, kiu estas multsignifa ankaŭ por internacia eŭropa trafiko. La stacion trapasas la plej grava fervojlinio en Ĉeĥoslovakio, kiu dividiĝas ĉi tie en du branĉojn kaj kunligas industriajn nord-okcidentan Bohemion kaj ĉefurbon Praha kun industria Ostrava-regiono kaj Slovakio en orienta direkto kaj kun urboj Brno-Bratislava en sudorienta direkto. Ĉiujare oni trafikigas centmilojn da vojaĝantoj kaj milionojn da tunoj da varoj per elektrizita fervojlinio. Prave la urbo Česká Třebová estas nomata ankaŭ "urbo de bluj uniformoj".

Sub ĉiĉeronado de ing. Ladislav Kovář ni vizitis "Placon de la paco" kun nove konstruitaj domblokoj, poste ni iris en historian parton de la urbo, kie ni trarigardis la preĝejon de sankta Jakobo, konstruita en empira stilo en jaro 1801. Antaŭ la preĝejo estas lokitaj barokaj statuoj de sankta Katarino, de sankta Barbaro kaj de sankta Jan Nepomucký de jaro 1717, 1719 kaj 1712.

Poste ni sur placo de "Fratigo" vidis renesancan konstruaĵon de la malnova urbdomo de jaro 1547, kie nuntempe estas lokita urba muzeo kun antikvaj kolektaĵoj el historio de la urbo, tiamaj metioj kaj popola arto. La muzeo havas ankaŭ fervojistan sekcion. Najbara domo - ekslernejo - estas la nova urbdomo, sidejo de Urba Nacia Komitato. Antaŭ la urbdomo staras Maria-kolono de jaro 1706 kaj en alia parto de la placo bronza statuo de Fratiĝo - verko de la nacia artisto, skulptisto Karel Pokorný el jaro 1948. La vojo kondukis nun poste sur dekstran bordon de rivero Třebovka, kie staras jam de unua duono de 13-a jarcento la preĝejo de sankta Katarino, unika memoraĵo de romanika stilo. La volbo super la altaro kaj flanka enirejo estas en gotika stilo. Sur la altaro staras altvalora ligna statueto de sankta Katarino. La tureto de la preĝejo estas konstruita en baroka stilo. Malnova tombejo, situinta ĉirkaŭ la preĝejo, estis ŝanĝita en silentan intiman parkon.

Sed Česká Třebová ne estas nur historia kaj fervojista urbo. En la urbo troviĝas ankaŭ granda industria entrepreno "Primona", eksportanta siajn produktojn - subtilajn kotonajn kaj poliesterginajn teksaĵojn - en ĉirkaŭ 80 landojn de la tuta mondo. Ekzistas ankaŭ multaj aliaj industriaj entreprenoj, donantaj sufiĉe multajn laboreblecojn por loĝantaro de la urbo kaj de ĉirkaŭa regiono. Tra urba parko "Javorka", la plej multe vizitata loko en la urbo pro ĝia bela situo kaj agrablaj kvietaj lokoj, ni revenis al Kultura domo de fervojistoj, kie centoj da partoprenantoj kun ĝuo spektis kulturen programon de la geknaĵoj, konsistanta el fabelaj scenetoj en Esperanto. Poste ni auskultis interesan prelegon de f-ino Elfriede Kruse el FRG kun akompano de multaj koloraj diapozitivaj pri sia vojaĝo tra Ĉinio.

Post komuna vespermanĝo okazis kultura vespero kun danco kaj riĉa tombolo. Dimanĉe post matenmanĝo ni komune ekskursis tra vilaĝ kvartalo sur pilgrim- kaj refreŝiĝlokon "Hory", kie estas restoracio kun dancsalono. La kapelo, en kiu tiutage okazis pilgrimdiservo, estis konstruita en jaro 1834. Post komuna tagmanĝo en la restoracio multaj partoprenantoj devis adiaŭi. Ni adiaŭis nevolonte, ni forveturadis al siaj hejmlokoj kun multaj rememoroj kaj travivaĵoj, kun espero denove travivi similan okazaĵon kun partopreno de niaj enlandaj kaj eksterlandaj kolegoj kaj amikoj.

Jindřich Tomášek



konversacio por komencantoj

Dua temo: LOGĜADO

Flej taŭga komenco por la familio estas, se ĝi povas vivi en propra loĝejo. La loĝejoj situas en domoj. Ilin elkonstruis masonistoj el ŝtono, brikoj, ligno, betono kaj aliaj materialoj. La domoj havas eksterajn murojn kaj internajn vandojn. Se ili estas el brikoj aŭ ŝtonpecoj, do tiuj estas kunigitaj per mortero. La mortero estas ankaŭ murojn kaj vandojn kiel morterizo. Artisma mortero estas stuko. La morteron preparis masonistoj el kalko, gipso aŭ cemento, kiun oni miksis kun sablo kaj akvo. Alia materialo por domkonstruado bezonas alian teknikon. Ekzemple el betono estas prefabrikatoj kaj plataj paneloj, kiujn oni kunnuntas.

La domo situas sur argila, sabla aŭ ŝtona grundo. Unue la fosistoj elfosas fundamentojn kaj la masonistoj masonas laŭ planoj de arkitektoj diverse fortajn murojn kaj vandojn. En ili estas kelo, teretaĝo, pluaĵ etagoj, subtegmento, balkonoj, absidoj, turoj kaj tegmento. La kelo estas malsupre inter la fundamentoj. La tegmento kuŝas sur tegmenta trabaro, kiu nomigas ĉevrono, kaj estas plata aŭ oblikva. Ĝi estas tegita per tegoloj, ladoj, lignaj ŝindoj, pajlo, kartono aŭ alia materialo. La antaŭa muro de domo estas plej ofte ortangula fronto. Super ĝi povas esti aliformaj frontonoj. Triangulaj aŭ aliformaj suproj de flankaj muroj estas gabloj. La tuta aspekto de ĉiuj eksteraj muroj estas fasado.

Tra la dompordo oni eniras plej ofte pavimitan koridoron. El la teretaĝa koridoro kondukas ŝtuparo al aliaj etagoj kaj al la kelo. En modernaj domoj kun pluraj etagoj estas liftoj. Ŝtuparoj en turoj estas ofte helikaj. En privataj domoj, kiuj estas aŭ vilaoj por unu familio aŭ ludomoj por pluraj familioj, estas loĝejoj konsistantaj el unuopaj ĉambroj. Flej komforta loĝejo estas apartamento, kie estas vestiblo kun ununura enirpordo kaj la ceteraj ĉambroj estas alireblaj en tiu ĉi vestiblo. En publikaj domoj estas haloj kaj salonoj. En ĉambroj, halo kaj salonoj estas pordoj kun fenestroj, vandoj, malsupre plankoj, supre plafonoj, kamentoj kaj diversaj mebloj. La mebloj estas plej ofte el ligno. Sur la tablo oni mangas kaj skribas, en la sranko estas vestaĵoj kaj ŭjaroj, sur la seĝoj, brakseĝoj kaj foteloj oni sidas, sur litoj, kaŭĉoj kaj divanoj oni kuŝas kaj dormas, sur bretoj, etageroj kaj en kestoj estas diversaj objektoj, en fornoj oni hejtas. Kelkaj mebloj havas klinkojn, kiujn oni premas, aliaj ansojn, kiujn oni tenas kaj tiras. Pordoj havas serurojn, per ŝlosiloj oni povas ilin ŝlosi. Nokte ĉambrojn lumigas ampoloj en

lampoj aŭ fluoreskiloj. Ili funkcias per elektro, kiu estas alkondukata el la elektra cirkvito. Per ĝi oni ankaŭ glēdas, kuiras, lavas, hejtas kaj ordigas. Por ordigado estas aŭ elektra polvo-sorbilo aŭ nura balailo. La alkonduko de elektro estas reguligata per ŝaltiloj, komutiloj kaj kontaktingoj. Elektraj aparatoj havas ŝnurojn aŭ kablojn kun kontaktiloj. La akvo estas en akvotubaro aŭ akvedukto. En modernaj domoj estas ankaŭ gastubaro. Tubojn oni reguligas per kranoj. En modernaj domoj estas krome tuboj de centra aŭ eksterdoma hejtadoj. En tiuj kazoj ne estas en ĉambroj fornoj, nur radiatoroj. Por kuirado sufiĉas kuiriloj.

La apartamento konsistas plej ofte el dormejo, kuirejo, saloneto kaj apartenaĵo: necesejo, provizejo, banejo, vestiblo, balkono ktp. Ekster la domo estas hejtatejo, karbejo kaj lignejo, deponejo, aŭtejo aŭ garaĝo, sekigejo kaj remizo. Ĉio povas esti ankaŭ en kelo. En diversaj ĉambroj estas diversaj ekipaĵoj por diversa uzado.

Dum vojaĝoj oni loĝas en pli komfortaj hoteloj aŭ simplaj tranoktejoj. Por ripozo dum forpermeso oni povas ankaŭ ripozi en propra kabano aŭ en tendo. La tendo estas facile konstruebla, sed la komforto estas malgranda. Simplaj tendoj konsistas nur el velo, stangoj kaj palisetoj, pli komfortaj havas subtendaĵon kaj supron en formo de piramido aŭ prismo. Budo estas ligna konstruaĵo por materialo, oni povas trovi en ĝi malkomfortan rifugon. Barako estas ligna konstruaĵo por komuna loĝado de soldatoj, laboristoj, malsanuloj, arestitoj kaj aliaj homoj. Stando estas budo por vendado, kiosko estas pli luksa stando. En gardenoj estas altanoj kaj pavilonoj. Autokampingo estas ĉaro trenata de aŭto, en tia ĉaro oni povas ankaŭ loĝi. Precipe dum forpermesoj oni kampadas, tendumas kaj pasigas liberan tempon en diversaj restadejoj.

Domposedanto povas esti unuopulo, entrepreno, kooperativo aŭ komunumo. Al domposedanto oni pagas lupagon. La domoj estas diference grandaj, la nombro da etaĝoj estas tre diferenca. Ekzistas nur teretaĝaj domoj, sed ankaŭ multetaĝaj domoj turformaj, nomataj ĉielatingaĵoj aŭ nubskrapaĵoj.

G r a m a t i k o: 1/ Trovu en la temo dek frazojn kaj skribu ilin kun alia subjekto, sed konservu la sencon. Ekzemplo: origine: Stando estas budo por vendado. Nove: En standoj oni vendas. - 2/ Nomu ĉiujn profesiojn el la temo kaj aliajn kiuj rilatas al la temo. Ĉu ĉiuj havas finaĵon -ist-? Klarigu koncize, kion ili faras. - 3/ Skribu parton de la temo en pasivo.

S t i l o: 1/ Priskribu vian domon kaj vian loĝejon. - 2/ Kion vi scias pri la domoj en la historio? - 3/ Skribu leteron, per kiu vi mendas meblaron por certa ĉambro.

D e m a n d o j: 1/ Kiom da etaĝoj havas la domo, en kiu vi loĝas? - 2/ Skribu dimensiojn de ĉambroj en via loĝejo. - 3/ Kiuj metioj ekipas loĝejon? - 4/ En kiuj mebloj estas la vitro? Kio alia en la loĝejo estas el vitro? - 5/ Kiom kostas loĝado en hotelo, en tranoktejo? De kio dependas la prezo?

NI FUNEBRAS...

S-ano Antonín Bartoněk, dumviva membro de ĈEA, subite mortis en Ostrava-Foruba la 5an de marto 1986, estante 83jara. En oktobro 1952 li fondis la lokan E-grupon ce tiama Uzina klubo de Bytostav. Tio estis pionira ago en la nove konstruata kvartalo de Ostrava. Honoron al lia memoro! /St./

La 28-an de marto 1986 mortis en aĝo de 62 jaroj membrino de Esperanto-klubo en Olomouc s-anino Vlasta Obručová, kiu entreprenis vicon da vojaĝoj en diversajn ekzotikajn landojn, precipe en Japanion kaj Havajan insularon. Pri siaj vojaĝoj, dum kiuj ŝi ĉiam uzis Esperanton, ŝi faris multajn prelegojn kiel lektorino de Socialista Akademio.

Post peza malsano forpasis la 10-an de junio 1986 membro de la centra komitato de ĈEA kaj de la redakcio de Starto

s-ano Jaroslav Klement

el Karlovy Vary. Li estis nur 50-jara...

Li estis unu el la plej laboremaj esperantistoj en nia lando. Longajn jarojn li okupiĝis pri la informado pri Esperanto, verkis artikolojn pri la ĝusta aranĝo de monstrokestoj, aranĝis ekspoziciojn dum la kongresoj de ĈEA kaj ĉe aliaj okazoj, li laboris kiel prezidanto de la Gazetara kaj informa komisiono de ĈEA, eldonanto de ties Bulteno kaj iniciatinto de Ĉeĥlingva Esperantské noviny, kunautoro kaj aranĝanto de diversaj flugfolioj, informiloj kaj afiŝoj, iniciatinto de Ĉeĥlingva informlibro pri Esperanto (sed kiu bedaŭrinde ne efektiviĝis). Li estis la motoro de la movado en Karlovy Vary, aranĝanto de la Ercmontaraj renkontiĝoj de la ĉeĥoslovakaj kaj germanaj esperantistoj.



Lia granda hobbio estis heraldiko kaj veksilologio; en tiuj sciencoj li estis vera fakulo, li verkis "Heraldiko-veksilologio-terminaron", la unuan tiufakan libron en Esperanto, dum mallonga tempo li eldonis "blazon' kaj flag' bultenon". Liaj planoj por la estonteco estis grandaj, sed la sorto estis tro kruela.

La funebra ceremonio okazis la 13-an de junio en Karlovy Vary. En la delegacio de ĈEA estis liaj plej intimaj samideanoj D-ro Jermář, J. Kašparec, K. Franc, Ing. Turková kaj N. Nýdlová. La adiaŭan paroladon havis la prezidanto de ĈEA D-ro J. Jermář, CSc. - Kondolencon al lia edzino, nia agema samideanino!

red.



KORESPONDDEZIROJ ANONCOJ

Esperanto-Klubo en Siberia urbo Krasnojarsk planas organizi ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el diversaj landoj. Temo de la ekspozicio estas "Infanoj de la mondo vivu en paco!"

La desegnaĵojn sendu laŭ adreso: USSR, 660075, KRASNOJARSK, p.k. 2420, Esperanto-klubo.

Reciproke ni sendos al vi desegnaĵojn de sovetiaj infanoj aŭ bildkartojn pri nia urbo au esperantaĵojn.

La gajnontoj de unuaj loko, ricevos premion. Sur dorsa flanko de la desegnaĵo post titolo skribu nomon kaj familinomon de aŭtoro, aĝon, landon kaj laeble adreson.

Ni esperas je aktiva reeĝo de multaj E-kluboj kaj organizaĵoj. Infandeseĝnaĵoj servu al amikeco kaj paco en la mondo! Krasnojarska Esperanto-klubo

• 44-jara esperantisto deziras korespondi pri kreado de Internacia Instituto de Homo por konservo de la civilizaĵo sur la Tero.

Lia adreso: USSR, 630090, NOVOSIBIRSK 90, Dovostrebovania Korejŝa A. O.

• Korespondi deziras A. V. Korĵenkov, ab. ja. 287, SU-620145 SVERDLOVSK, USSR

• 11-12-jaraj kursanoj volas korespondi kun junaj geesperantistoj el Ĉeĥoslovakio. Adreso de la kursestro (skribu ĝin ruse): SU-295300 VOLOVEC, Zakarpatskoj obl., ul. Lenina 99/1, Nellja Korol

• Geesperantistoj el la taĝika ĉefurbo Duŝanbe deziras korespondi kun kiu ajn el nia lando:

• 1) Jusupov Marat, 24 jaroj, ekonom-geografisto, ul. Kovalja 5/8-32, SU-734058 DUŜANBE

• 2) Ikromov Taĝiboj, Glavpoĉtamt, SU-734025 DUŜANBE

• 3) Aleksejenko Larisa, 27 jaroj, fraulino, konstru-inĝenerino, ul. 40-let Taĝikistana, 133-36, SU-734005 DUŜANBE

• 4) Marieva Natalia, 19 jaroj, fraulino, studentino de filologia fakultato, ul. Fedina 50/1-29, SU-734043 DUŜANBE

• 5) Irina Trubnikova, 20 jaroj, fraulino, studentino de arta instituto, pr. Pravdy 39/2-27, SU-734043 DUŜANBE

• 6) Nadeĵda Smidt, 26 jaroj, ĥemiistino, ul. Kafernigan 4, SU-734010 DUŜANBE

• 7) Frejliĥ Lilija, 26 jaroj, geofizikistino, ul. Fedina 8/1-18, SU-734049 DUŜANBE

• 28-jara fraŭlo, maŝinteknikisto, interesigas pri sporto, turismo, muziko, kino: Bulgario, JAMBOL, str. Georgi Ĉernev N 25 A, Ivan Jeljazkov

• Nova esperantistino volas korespondi kun pli aĝa sinjorino au sinjoro, interesigas pri turismo: Barbara Wrzesinska, ul. Ĥączna 31 B M 22, 07-200 WYSZKÓW Sur. P. 33 Woj. Ostrołęka, Pollando

- Novaj polaj geesperantistoj, kiuj komencis lerni la lingvon antaŭ kelkaj monatoj kaj volas korespondi kun diverslandanoj por praktiki la lingvouzon:
- 28-jara instruisto, interesiĝas pri turismo, muziko, sporto kaj literaturo, kolektas bildkartojn, turismajn prospektojn kaj sonkasetojn: Tadeusz Pancerz, Grochów 39, 57-257 BRZEŹNICA, Pollando
 - 21-jara oficistino, interesiĝas pri literaturo, filmo, turismo kaj ankaŭ junulara muziko, satas legi historiajn romanojn, kolektas bildkartojn: Alicja Rózek, ul. 31. Stycznia 44/43 PL-89-600 CHOJNICE, Pollando
 - 32-jara laboristo, korespondas pri ĉiuj temoj, kolektas bildkartojn, postmarkojn kaj monerojn: Jan Arendarczyk, Plac Wolności 13/3 54-420 LUBAWKA, Pollando
 - 27-jara laboristino, fraŭlino, interesiĝas pri turismo kaj pri lernado de diversaj lingvoj: Maria Ziętek, ul. Chopina 25 m. 5, PL-05-800 PRUSZKÓW, Pollando
 - 30-jara oficistino, edziniĝinta, interesiĝas pri muziko, filmo, turismo, modo, fotoarto, kolektas bildkartojn, modon: Ewa Heinrich, ul. 1 Maja 25/1, PL-58-100 ŚWIDNICA, Pollando
 - 20-jara studentino, interesiĝas pri turismo, sporto kaj muziko, kolektas turismajn prospektojn: Jolanta Jacek, ul. Modrzejewskiej 5, PL-34-500 ZAKOPANE, Pollando
 - 11-jara frekventanto de elementa lernejo interesiĝas pri arkeologio kaj naturo, tre satas ludi sakon kaj legi librojn, kolektas postmarkojn, krajonpintigilojn: Lukasz U-niejewski, ul. Opolska 8/26, PL-44-335 JASTRZĘBIE ZDRÓJ,
 - Teresa Jankowska, ul. Iwicka 40 m 18 PL-00-735 WARSZAWA
 - 18-jara studento interesiĝas pri lingvoj, bildkartoj, vojaĝado, muziko: John R. Wright, 188 Court Road, ORPINGTON Kent BR6 0PY United Kingdom
 - En 1987 en Sofio okazos EKSPozICIO DE KOLEKTAJOJ honore al 100-jara jubileo de Esperanto en tri sekcioj:
 1. D-ro L. L. Zamenhof sur bildkartoj.
 2. Bildkartoj kun surskriboj en Esperanto.
 3. Kongresaj urboj de la Universalaj kongresoj de Esperanto (prefere en la jaro de la koncerna kongreso).
 Preparas la ekspozicion la konata bulgara kolektanto-esperantisto Georgi Litov, sub la auspicio de Bulgara Esperantista Asocio kaj la Asocio de Bulgara Filatelistoj. Estas petataj la esperantistoj tutmonde kontribui al la ekspozicio per dispono de konvenaj eksponaĵoj, ĉu donace, ĉu rekompence. Ĝion sendu al adreso: Georgi Litov, Hipodroma 34-A, 1612 SOFIO, Bulgario

kroniko



Poeto JIRÍ KAREN, gvidanto de la Artliteratura sekcio de ĈEA, estas aŭtoro ne nur de ok ĉeĥaj poemaroj, sed nun ankaŭ de unu Esperanta poemlibro, nome "Flugilhava ŝtono", kiu aperis en Brazilo. La libro enhavas poemojn originale verkitajn en Esperanto, sed ankaŭ tradukitajn el la ĉeĥa fare de Jiří Kofínek. En ĵus aperinta dika vortaro "Ĉeĥaj verkistoj de la 20-a jarcento", redaktita de M. Blahynka kaj eldonita de eldonejo "Ĉeĥoslovaka verkisto", estas artikolo pri Jiří Karen kaj jam en la unua frazo estas akcentita lia poresperanta aktiveco. En la artikolo troviĝas eĉ esperantlingvaj titoloj de broŝuroj, kiujn li redaktis por la artliteratura sekcio.

En la sama vortaro "Ĉeĥaj verkistoj de la 20-a jarcento" troviĝas ampleksa artikolo ankaŭ pri JOSEF RUMLER, ĉeĥa poeto kaj literatursciencisto. Pri lia esperantisteco ne estas tie mencio, tamen Rumler jam dum kelkaj jaroj okupiĝas ankaŭ pri Esperanto. Baldaŭ estas aperonta lia studo "Esperanto kiel lingvo literatura" en formo de suplementa broŝuro al Paco. En simila broŝuro titolita "Kvarfolio" aperis ampleksa poemo de J. Rumler "Lasta ĉevalo", kiu elvokis vastan favoran reeĥon tra la mondo. Ekz. en Literatura Foiro skribis Nicolino Rossi, ke J. Rumler estas "la poeto de la jaro, la sensacia malkovro de nova, brila astro en la firmamento stelmalriĉa de nia literaturo".

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Struncová, grafika aranĝo: Jaroslav Klement kaj Jiří Hanousek. Presas Ruch Liberec. Transdonita al preĝejo 31. 7. 1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK au 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA au rektavoje al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Struncová, grafická úprava: Jaroslav Klement a Jiří Hanousek. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne Ruch Liberec. Předáno do tisku 31. 7. 1986. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Reditelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. dubna 1979.

Výtvarná řemesla

Praha

**Vám nabízejí široký
sortiment bytových
dopiňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.**

NABÍZÍME:

**SOUSTRUŽENÉ MOCGA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STÓLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
A POPELNÍKY
VÝROBKÝ Z ČINU**

**BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KOŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovnice Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979

00 12.